

# MONATA LETERO DE LA PREZIDANTO

PHILIPPE ROUCHE

president.fisaic@orange.fr

La nova jaro 2019 komenciĝis - januaro ĵus finiĝis. Post la ĝeneralkunveno en Ateno en oktobro ni sendis al vi la studraporton de la laborgrupo 'Komunikado'. Ni petis al vi respondi kaj doni viajn pensojn kaj ideojn. Kelkaj faris, sed multaj ankoraŭ ne respondis.

Estas malbone, ĉar la estonteco de FISAIC estas la komuna laboro de ĉiuj membroj, kaj ni bezonas la kontribuon de ĉiu ajn por la laboro. La estraro renkontiĝos en marto. Por havi konkretajn proponojn por la venonta ĝeneralkunveno, mi proponas al tiuj, kiuj ankoraŭ ne respondis, ke ili uzu la monaton de februaro por fari tion kaj doni viajn proponojn kaj sugestojn. Mi antaŭdankas vin.

Cetere, ne hezitu skribi al la Ĝenerala Sekretario pri okazaĵo, evento aŭ ekspozicio en via lando, tiel ke oni povu meti en la hejmoaĝon de FISAIC.

Februaro 2019

*Ni agu kune!*